

少欲知足

Deziru ne tro kaj sciu kontentiĝon

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

このことばは仏教のいくつかの経典に見出すことができます。有名なことばですので引用されることが多く、みなさんもおそらくご存知でしょう。

たとえば『佛遺教経』は次のように述べます。

「多欲の人、利を求めることが多いが故に苦悩も亦多し。少欲の人、無求無欲にして則ち此の患い無し。」

私たちが暮らす社会は資本主義社会です。これは、そこに暮らす人間の欲望を刺激し、どんどんと物を買ってもらい、それによって経済成長を遂げようとする社会です。利潤追求が善とされ、人間の価値が「どれだけ資産を持っているか」によって測られるような社会です。

毎日テレビで無数のコマーシャルが放映されています。新製品が次々と開発され、新型モデルが発売され、従来品は捨てて顧みられなくなります。ある人に聞いた話ですが、「テレビにしる冷蔵庫にしる、だいたい10年で壊れるように設計してある。技術上ではもっと長持ちする製品を作ることは可能だが、それでは新製品が売れなくなるから、会社としては壊れてくれないと

Tiu ĉi frazo aperas en kelkaj budhismaj sutroj. Ĉar oni ofte citas ĝin, probable vi jam scias ĝin, ĉu ne?

Ekzemple la sutro "Lasta Instruo de la Budho" diras:

"Tiu, kiu multe deziras, serĉante grandan profiton, suferas multe. Tiu, kiu malmulte deziras, serĉante nenion, ne suferas pro deziro."

La socio, en kiu ni vivas, estas kapitalisma. Tiu ĉi socio stimulas dezirojn de la homoj tie vivantaj, instigas ilin aĉeti ĉiam pli multajn varojn, por ke ĝi ekonomie kresku. Tie oni rigardas profitadon kiel bonon, kaj valoro de homo estas mezurata per lia/ŝia riĉeco.

Ĉiutage oni dissendas sennombrajn reklamojn sur televido. Novaj produktaĵoj sinsekve realiĝas, novaj tipoj alterne aperas, kaj oni forĵetas malnovajn aĵojn kiel senvaloraĵojn. Mi iam aŭdis de iu: "Ĉu televidilo, ĉu fridujo, varojn oni desegnas tiel, ke ili difektiĝu post ĉirkaŭ 10 jaroj. Teknike eblas desegni produktaĵojn kun pli longa vivo. Sed se tiel fari, entrepreno

困るのだ」と。パソコンなどは10年どころの話ではありません。1年か2年のうちに、同じメーカーから新しい製品が登場します。古いパソコンを使い続けようと思っても、インターネット上ではアプリケーションソフトが対応しきれなくなって、いやでも買い換えせざるを得なくなるような始末です。

経済成長の名のもとに、人間の欲望を肥大化させ、環境を破壊し、資源を奪い合い、挙げ句の果てに殺し合いまでする... こんなことの愚かしさにいいかげん気づくべきです。

私たちは今まで経済成長を至上命題としてきましたが、これからもずっと永遠に成長し続けることは不可能です。ゼロサム社会という言葉が示すように、誰かが利益を得れば、別の誰かが不利益をこうむる、そのような社会が現代です。アメリカの経済学者サローの用語で、今日では常識となりつつあります。

ゼロサム社会は、人間の欲望の肥大化を放置しておくならば、格差社会における格差の拡大、すなわち富める者はますます富み、貧しい者はますます貧しくなっていく社会になります。しかし、欲望をうまくコントロールし、みながほどほどに充足できる可能性もないわけではありません。

ここで大切になるのが、仏教が大切にしてきた「少欲」ということです。これは禁欲ではありません。人間が生きていく上で、少々の欲はしかたがないといえます。無理して、我慢して欲を断ち切ることを仏教は勧めているわ

ne povas vendi novajn varojn, tial estas necese ke ili difektiĝu." Se temas pri komputiloj, ilia uzdaŭro estas multe malpli ol 10 jarojn longa. Post 1 aŭ 2 jaroj jam aperas nova tipo el sama fabrikanto. Eĉ se oni volas daŭre uzi ĝisnunan komputilon, tio efektive ne eblas, ĉar interrete softvaro jam ne validas.

Sub la nomo de ekonomia kresko ni grasigas nian deziron, detruas medion, rabas naturajn provizaĵojn, eĉ mortigas inter ni... Ni nun devas esti konsciaj pri tiaj ĉi absurdaĵoj.

Ĝis nun ni akceptis ekonomian kreskon kiel absolutan ordonon. Sed ne estas eble, ke kresko eterne daŭras. Kiel la vorto *zero-sum society* (socio de nul-sumo) montras, en la nuna socio, se iu gajnas, alia malgajnas. Tiu ĉi vorto estis proponita de usona ekonomikisto Thurow, kaj lia teorio pli kaj pli fariĝas komuna kono hodiaŭ.

Socio de nul-sumo, se ni lasas homan deziron grandiĝanta, fariĝas tia socio, en kiu diferenco pli kaj pli grandiĝas, nome riĉuloj pli riĉiĝas kaj malriĉuloj malpli riĉiĝas. Sed ne malestas la ebleco, ke ni povas lerte regi nian deziron kaj ĉiuj kontentiĝas moderaj.

Ĉi tie rimarkindas la budhisma ideo "deziru ne tro". Tio ĉi ne signifas stoikismon. Dum homoj vivas, iom da deziroj estas neeviteblaj. Budhismo ne rekomendas distranĉi dezirojn perforte

けではありません。たとえば、美味しい物が食べたいのは自然なことです。食欲がなければ人間は生きていきません。食欲が悪いのではなくて、食べ過ぎるのがよくないのです。「腹八分目医者いらす」とはよくいったものです。

日本は食料自給率が4割にも満たず、年間 5500万トンの食料を輸入しながら、1800万トンも捨てています。これは約5000万人分の食料に相当します。その一方で、世界では毎年約1500万人が餓死し、慢性的に栄養不良にある人が10億人います。つまり、日本を含む豊かな国の人たちが、食べ物を粗末にせず、食べ過ぎなければ、世界から飢餓はなくなるのです。太り過ぎによる病気も防げるでしょう。

仏教では「餓鬼」という世界を想定します。世界に餓えた子どもたちが大勢いる一方、食料を金の力に物をいわせて買いあさり、食べきれずに捨てている、そういう世界をいうのではないのでしょうか。飢えと強欲、この二つは「餓鬼」の表と裏の両側面なのでしょう。

断・捨・離という言葉が流行りました。家の中にある物を整理するのもいいでしょうが、本当に必要な物しか買わない。これですぐいぶんと余裕がうまれるのではないのでしょうか。

kaj nevole. Ekzemple ni volas manĝi bongustaĵojn, kaj tio estas natura. Sen apetito homoj ne povus vivi. Apetito ne estas malbona, sed tro manĝi estas malbone. La proverbo trafe diras: "Modera manĝado forigas kuraciston."

Japanio, kies memproviza proporcio de manĝaĵoj ne atingas 40%, ĉiujare importas 55 megatunoj da nutraĵoj kaj samtempe forĵetas 18 megatunojn, ekvivalentajn al manĝaĵoj por 50 milionoj da homoj. Dume en la mondo ĉiujare satmortas 15 milionoj da homoj, kaj 1 miliardo da homoj estas en konstanta subnutreco. Se homoj en Japanio kaj aliaj riĉaj landoj ne malzorgus manĝaĵojn kaj ne tro manĝus, malsato ne estus en la mondo. Aldone, malsano pro grasiĝo povus esti preventata.

Budhismo imagas la mondon de "malsatulo" En la mondo troviĝas multaj infanoj malsataj, dum aliaj per la forto de mono ĉase aĉetas manĝaĵojn kaj forĵetas ne povante ĉion manĝi. Jen tiu ĉi sceno estas la budhima imago pri "malsatulo": malsato kaj avideco estas la du aspektoj de la sama stato.

Iam furoris la frazo "fortranĉo, forĵeto, forlaso". Estas bone redukti aĵojn en hejmo, sed estas pli bone aĉeti nur vere necesajn aĵojn. Tiel ĉe ni estiĝas libereco en nia vivo, ĉu ne?